43-a Brazila Kongreso de Esperanto

Fortalezo, 12-16 Julio 2008

Kongresa temo: Infano – kia grundo

DUA BULTENO

Pri la temo

La temo elmontras la zorgon de Ikk pri la ĉijare komenciĝanta nova jarcento por Esperanto-movado en nia lando. Oni esperas, kiel rezulto de niaj multaj kaj diverstemaj kongresaj kunsidoj, verkadon de dokumento cele al infana mondo, montranta vojojn por ĝin trafi, kaj Ke ĉiuj kongresanoj aktive partoprenu kaj kontribuu al tiu nia celo.

Indekso

1. Loka Kongresa Komitato
2. Kongresejo kaj solena malfermo
3. Loĝado en Fortalezo
4. Kongresaj ekskursoj
5. Prelegoj kaj aktivaĵoj
6. Budoj
7. Komuna loĝejo
8. Ekspozicioj
9. Konkursoj

1. Loka Kongresa Komitato

Prezidanto - Wandemberg Ribeiro Morais (wandembergmorais@bol.com.br)
Vicprezidanto - Paulo Amorim Cardoso (esperantoamorim1@uol.com.br)
Unua sekretario - Hilbernon Almeida Filho (hilbernon@yahoo.com)
Dua sekretario - Luana C. Lima Gazin (luana@prce.mpf.gov.br)
Unua kasisto - José Roberto Alves de Allbuquerque (jrobertoalvesbr@yahoo.com.br)
Dua kasisto - Antônio Beserra

Komisiitoj

Infankongreseto - Iraneide de Oliveira Lopes (iraneidelop@yahoo.com.br)
Junularaj aferoj - Leandro Sousa Moreira (tarkuax@hotmail.com)
Giĉetoj kaj kongresejo - Antônio José da Silva
Personaro - Afonso Silva de Lima
Ekskursoj kaj loĝigo - Damiana Britto (anaimmad@yahoo.com.br)
Artaj aranĝoj - Tarcísio Lima (cislima@gmail.com)
Kongresa kuriero kaj Eksteraj rilatoj - José Leite de Oliveira Jr. (leitejr@uol.com.br)
Informado - Golbery Gomes Capistrano (golbery@gmail.com)
Cerimoniestro - Karlo Kardozo (karlokardozo@yahoo.com.br)
Programo - Michelson Sávio Herbster Moura (michelson@bol.com.br)

Kontaktoj: 43bke2008@gmail.com

2. Kongresejo: Cearaa Federacia Universitato. Avenuo da Universidade, 2683

Kvartalo Benfica.

Malferma Soleno (ĉe Rektorejo): Avenuo da Universidade, 2853 – Benfica
Ĝi okazos sabate je la 20-a horo.

Rektorejo de Cearaa Federacia Universitato

3. Loĝservo en Fortalezo

3.1. Malmultkosta loĝejo (matenmanĝo inkluzivas)

Temas pri monaĥejo ĉe Avenuo da Universidade proksime al la kongresejo. Restado dum la kongreso kostas R$100,00. Ĝin mendu tuj, skribante al retadreso de LKK kaj deponu la koncernan valoron en la konton de Cearaa Esperanto-Asocio ĉe Bradesco – Agentejo 0682, konto 1.001.253-8. Bv. sendu al LKK anekse al la retmesaĝo la deponateston aŭ simple informu al ni vian nomon kaj la depon-daton. Informu vian nomon al Bradesco-kasisto. Ankaŭ eblas deponi la valoron en la privatan konton de la unua kasisto, ĉe Banco do Brasil, Agentejo 3140-2, konto 41.937-0.
LKK-retadreso: 43bke2008@gmail.com

3.2. Hoteloj ĉe marbordo

Oficiala turisma agentejo: Naja Turismo Ltda. Strato Carolina Sucupira, 480; kvartalo Aldeota; Fortalezo – Cearao – Brazilo; telefonnumero: 85 4008 5900; fakso: 85 4008 5918 - retpaĝaro: http://www.naja.tur.br/

La loĝservo inkluzivas:
- kvar tagnoktojn de la 12-a ĝis la 16-a de Julio 2008
- matenmanĝon, kiam ĝi estas servita en la hotela restoracio
- veturadon el flughaveno al hotelo kaj el hotelo al flughaveno (alveno kaj foriro)

Pagmaniero.
Hotelo: ĝis 5-foje sen interezo; la lasta pago estas en la 1-a de Junio 2008
La prezoj estas por ordinaraj ĉambroj; por superkvalitaj, marvidaj aŭ kvarlitaj ĉambroj, la prezoj estas subkonsulte.
Flugvojaĝo: je 6-foje sen interezo per kreditkarto; kun speciala rabato por la kongreso la valoroj estos poste informitaj.
Malmendo: ĝis kvar monatoj antaŭ la evento eblas malmendi perskribe, tamen oni pagos al organizanto la faritajn elspezojn aŭ monpunojn pagitajn pro la malmendo.

Rimarkoj:
- la prezoj je realoj kaj po persono submetitas al ŝanĝoj kaj disponebleco sen antaŭa averto;
- la tagnoktoj komenciĝas je la 14-a kaj finiĝas tagmeze;
- la prezoj inkluzivas servopagojn kaj impostojn.

Pri la kontaktitaj hoteloj de Naja Turismo, turismaj promenadoj kaj hotel-mapoj, aliru al http://www.naja.tur.br/ver_evento.php?id_evento=76

Ĝeneralaj kondiĉoj pri mendoj. La kondiĉoj de mendoj kaj malmendoj estas priskribitaj en ĉi tiu Bulteno. Mendante, ĉiu kongresano akceptas tiujn kondiĉojn. Estas konsilinde legi ilin antaŭ ol plenigi kaj sendi sian mendilon. Aliru al la mendilo per
http://www.naja.tur.br/reservas.php?id=76

Loĝdatoj. Kiel unuan loĝdaton oni kalkulas la daton de la alveno al la hotelo (ekloĝo); se oni venas iam post noktomezo, kalkuliĝas la dato de la antaŭa tago. Kiel lastan daton oni kalkulas la daton de la forlaso de la hotelo (foriro; do, la daton de la lasta mateno en la hotelo).

Eniro kaj eliro. Principe eblas okupi ĉambrojn post la tagmezo de la mendita dato kaj necesas forlasi la ĉambrojn ĝis la tagmezo de la lasta tago. Se oni ne okupas ĉambron dum la unua mendita tago, oni perdas la pagitan sumon rilate al la tagnokto ne uzita.

Dulitaj ĉambroj kaj hazarda kunloĝigo. La loĝiga servo ne povas aranĝi hazardan kunloĝigon de nekonatoj, pro kio dulitajn ĉambrojn oni disponigas nur al duopoj kiuj anticipe interkonsentis pri kunloĝado kaj menciis tion sur siaj mendiloj. Oni ĉiam fakturas la koston de plena ĉambro, do eĉ se la kunloĝanto forestas dum iu(j) tago(j).
Frueco de la mendo kaj alternativaj mendoj. Ĉar la mendeblaj kapacitoj ne estas senlimaj, kaj precipe pro tio ke la kongreso okazas dum la pinto de turisma sezono en Brazilo (gravas mendi kiel eble plej frue), kaj ne eblas

garantii la plenumon de la originala mendo ĉiam laŭ la preciza deziro de la mendanto, tial ĉe ĉiu mendo oni nepre menciu ankaŭ alternativajn loĝvariantojn.

Pago. La mendojn oni traktos nur post la ricevo de la koncerna pago.

Ofertataj servoj. Ĉiuj menciitaj hoteloj (ne nepre ankaŭ la studentejoj kaj aliaj pli modestaj loĝejoj) estas plene klimatizitaj, kaj ĉiuj ties ĉambroj havas telefonon, televidilon, duŝejon (kelkaj ankaŭ bankuvon) kaj necesejon. La matenmanĝo estas inkluzivita en la prezo, krom se menciite alie.

Limdato. La limdato por fari mendojn estas la 1-a de Junio 2008 kaj se estos disponebleco.

Loĝkonfirmo. Post la tuta pago vi ricevos la konfirmon kun detalaj informoj pri la menditaj servoj. (hotelo, promenado kaj flugbileto).

Prezoj estas en realoj por unu persono por kvar tagnoktoj.

Hoteloj en Fortalezo. Loĝa Servo – Ĉiuj apartamentoj estas standard-tipaj

Hotelo	Kategorio	Ordinaraj tagnoktoj			Eksterordinaraj tagnoktoj		
		Unuopa	Duopa	Triopa	Unuopa	Duopa	Triopa
Casa Blanca	Simpla	413,00	256,00	238,00	88,00	48,00	44,00
Iracema Othon	Standarda	563,00	363,00	313,00	125,00	75,00	63,00
Brasil Tropical Residence	Mez-komforta	578,00	321,00	270,00	129,00	64,00	52,00
Portal da Praia	Sen informo	583,00	363,00	313,00	125,00	75,00	63,00
Oásis Atlântico Fortaleza	Tre komforta	603,00	348,00	xxxxxx	135,00	71,00	xxxxxx
Jangada Fortaleza Hotel	Mez-komforta	623,00	388,00	348,00	140,00	81,00	71,00
Maredomus	Mez-komforta	623,00	343,00	xxxxxx	140,00	70,00	xxxxxx
Quality Fortaleza	Tre komforta	693,00	446,00	433,00	158,00	xxxxxx	xxxxxx
Ponta Mar Hotel	Tre Komforta	738,00	438,00	378,00	169,00	94,00	79,00
Comfort	Komforta	743,00	403,00	xxxxxx	170,00	85,00	xxxxxx
Oásis Atlântico Imperial	Luksa	788,00	451,00	425,00	181,00	97,00	90,00
Plaza Suítes	Sen informo	793,00	428,00	368,00	183,00	91,00	76,00

4. Kongresaj ekskursoj

Ĝeneralaj kondiĉoj

Ĉar ĉiuj ekskursoj dependas de minimumo da partoprenantoj, la organizanto rezervas al si la rajton eventuale nuligi iujn ekskursojn, pri kio ĝi klopodos averti vin kiel eble plej frue antaŭ la kongreso, kun propono de eblaj alternativoj. Klopodu esti preta dek minutojn antaŭ la indikita starthoro de la ekskurso. Ĉiuj prezoj estas en realoj.
Ĉiuj aŭtobusoj estas klimatizitaj, kaj ĉiun ekskurson akompanas profesia ĉiĉerono. Kune kun la kongresaj dokumentoj, ĉe la aliĝo ĉiuj mendintoj ricevos koverton kun la menditaj kongresaj biletoj. Sur la biletoj estos bazaj informoj pri la ekskurso (dato, horo, buso).
Ne forgesu preni ŝirmilojn kontraŭ suno kaj varmo! Bv. noti ke la tereno en kelkaj ekskursoj povas esti netaŭga por homoj kun marŝhandikapoj. La priskriboj de la ekskursoj kutime mencias tion.

Antaŭ kaj post kongresaj ekskursoj
Ĉiuj programoj eblos okazi antaŭ aŭ post la 43-a Brazila Kongreso de Esperanto. Aliru al http://www.naja.tur.br/passeios.php?id_eventos=76#

La fluga tempodaŭro inter San-Paŭlo aŭ Rio de Ĵanejro ĝis Fortalezo estas tri horoj proksimume. Pro tio ni prezentas al vi tri specialajn programojn nomitajn antaŭkongresoj, kiuj igos la vojaĝon malpli laciga kaj ebligos al la kongresano plibone koni Brazilon.

1. **Eksterlando/ San-Paŭlo aŭ Rio de Ĵanejro /Foz do Iguaçu (legu foz do Igŭasu')/Fortalezo**

La unua tago - Rio de Ĵanejro
Alveno kaj veturado al hotelo
La dua tago - Rio de Ĵanejro
Veturado tra la urbo kaj vizito al la mondfama monto "Pão de Açúcar"
La tria tago - Rio de Ĵanejro
Veturado laŭ marbordo al la arbaro Tijuka kaj Korkovado
La kvara tago - Flugvojaĝo el Rio de Ĵanejro al Foz do Iguaçu
Veturado al flughaveno, alveno kaj veturado al hotelo
La kvina tago - Foz do Iguaçu
Tuttaga vizito al akvofaloj "Cataratas do Iguaçu"
La sesa tago - Foz do Iguaçu
Libera tago por golf-ludado aŭ vizito al Argentina landlimo
La sepa tago - Flugvojaĝo el Foz do Iguaçu al Fortalezo
Veturado al flughaveno, alveno kaj veturado al hotelo

2. Eksterlando/San-Paŭlo aŭ Rio de Ĵanejro/Salvador'/Braziljo/Fortalezo

La unua tago - Rio de Ĵanejro
Alveno kaj veturado al hotelo
La dua tago - Rio de Ĵanejro
Veturado tra la urbo kaj vizito al la mondfama monto "Pão de Açúcar"
La tria tago - Rio de Ĵanejro
Veturado laŭ marbordo al la arbaro Tijuka kaj monto Korkovado
La kvara tago - Flugvojaĝo el Rio de Ĵanejro al Salvador'
Veturado al flughaveno, alveno kaj veturado al hotelo
La kvina tago - Salvador'

Tuttaga vizito al la unua ĉefurbo de Brazilo, ĝiaj muzeoj, preĝejoj kaj monumentoj

La sesa tago - Salvador'

Libera tago por koni la lokajn vivmanierojn kaj dancojn

La sepa tago – Flugvojaĝo el Salvador' al Braziljo

Veturado al flughaveno, alveno kaj veturado al hotelo.

Alveninte tie, la tago estas libera

La oka tago – Braziljo

Veturado tra la Brazila ĉefurbo

La naŭa tago – Flugvojaĝo el Braziljo al Fortalezo

Alveno kaj veturado al hotelo

3. Eksterlando/San-Paŭlo aŭ Rio de Ĵanejro/Manaus/Fortalezo

La unua tago - Rio de Ĵanejro

Alveno kaj veturado al hotelo

La dua tago - Rio de Ĵanejro

Veturado tra la urbo kaj vizito al la mondfama monto Pão de Açúcar

La tria tago - Rio de Ĵanejro

Veturado laŭ marbordo al la arbaro Tiĵuka kaj monto Korkovado

La kvara tago - Flugvojaĝo el Rio de Ĵanejro al Manaus

Alveno kaj veturado al hotelo

La kvina tago - Manaus

Tuttaga vizito al Amazonia Praarbaro

La sesa tago - Manaus

Libera tago por viziti aliajn lokojn en Amazonia Praarbaro

La sepa tago - Flugvojaĝo el Manaus al Fortalezo

Alveno kaj veturado al hotelo

Loĝservo

1. En ĉiuj brazilaj urboj estas ampleksa nacia kaj internacia hotela reto, precipe en la supraj menciitaj urboj;
2. Fortalezo estas privilegiita ĉiaspekte. Estas pli ol 14.000 litoj en hoteloj je 2 ĝis 5 steloj.

Tritagaj Ekskursoj, minimume:
Aliru al http://www.naja.tur.br/passeios.php?id_eventos=76#

Lençóis Maranhenses

Grandega dezerto ĉe la Atlantika Oceana bordo, plena je sablodunoj kaj travideblaj akvaj lagetoj. La paradizo ekzistas kaj ĝia nomo estas: Nacia Parko de Lençóis Maranhenses.
La pejzaĝo estas nekredebla. La arbaro antaŭamazonia miksas kun la sablodunoj, kiuj ŝanĝiĝas je la formo kaj translokiĝas laŭ la vento-direkto. La Parko situas en ŝtato Maranhão, kies ĉefurbo estas São Luís, valorpropraĵo de la homaro.

Jericoacoara (Ĵerikŭakŭara)

Jericoacoara ĝuas merititan famon kiel unu el la plej belaj plaĝoj en la mondo. La loko estas unike bela kun siaj saharecaj dunoj kaj dolĉakvaj lagunoj kaj lagetoj. Tial ĝi altiras pilgrimantojn el la tuta mondo, sed tamen retenas la originalan senstreĉigan kalmon. Temas pri ideala loko por simpla sed superba ripozo. La programon vi povas mem kunmeti; eblecoj ne mankos surloke. Sed vi simple povas ankaŭ ripozi sur la strando kaj fari nenion krom ĝui la sunon kaj marbanon.
Je sia deveno, ĝi estas fiŝista vilaĝo kaj situas je ĉirkaŭ 300km de Fortalezo. Ĝi estas ĉirkaŭita de vera sablodunaro, kiu longe malfaciligis la iradon de vizitantoj al siaj vidindaĵoj. Ĉiuj ĝiaj stratoj estas sablaj . Ne estas publika lumiga servo kaj la elektra reto estas subtera, kio igas belan noktan spektaklon.

Tuttagaj dumkongresaj ekskursoj

Pri la tuttagaj ekskursoj oni interkonsentu pri kondiĉoj kun Naja Turismo, la oficiala turisma agentejo. La prezo ne inkluzivas tagmanĝon, sed estas antaŭvidita paŭzo, dum kiu ĉiu povos lunĉi laŭ propraj prefero, gusto kaj buĝeto. Kompense, la prezoj de la ekskursoj restas malaltaj.

Plaĝoj

(aliru al www.naja.tur.br/passeios.php?id_eventos=76)

Canoa Quebrada

Ekiro: ekde la sepa kaj duono Daŭro: unu tago Prezo:R$ 35,00

La plej fama plaĝo de Cearao, ĉe urbo Aracati (aracati signifas: vento kiu blovas el la maro). Loko simila al paradizo, kiu dum jardekoj allogas turistojn el ĉiuj anguloj de la mondo. Iam ĝi estis pilgrimejo de hipioj el la tuta mondo. Ĝiaj sablodunoj, ruĝaj klifoj kaj lagoj kaj la sennombra kvanto da fiŝoj kaj marestaĵoj certe igos tiun ĉi ekskurson neforgesebla. La ekskurso okazos ankaŭ vendrede.

Lagoinha
Ekiro: ekde la sepa kaj duono Daŭro: unu tago Prezo:R$ 30,00

Antikva haveno uzita de francaj piratoj (bukaneroj), nuntempe estas paca fiŝista vilaĝo. Konsiderata la plej bela plaĝo en la ŝtato Cearao, Lagoinha estas plena je sablodunoj kaj kokosarboj. Tie vi povas ĝui apartan kaj unikan panoramon, kiu redoniĝas kiel la plej reprezenta bildkarto de Cearao. Tie eblas fari ekologian veturadon per kamiono “pau-de-arara”, barko “catamarã” kaj aŭto “buggy”.

Morro Branco kaj Praia das Fontes
Ekiro: ekde la sepa kaj duono Daŭro: unu tago Prezo: R$ 30,00

Vera bildkarto, natura fenômeno je 79 km de Fortalezo. La famo de Morro Branco disvastiĝis tra la mondo pro la fakto, ke la plaĝo havas plurkolorajn dunojn kies sablon oni uzas por fari la plej aprecatan suveniron Cearaan. Tio estas la ĉie troveblaj boteletoj kaj vitraj kruĉetoj plenigitaj per la plej fajnaj diverskoloraj sabloj per kiu oni pentras belegajn bildojn kaj pejzaĝojn. Halto por lunĉo antaŭ ol daŭrigi al Praia das Fontes, plaĝo ĉe Morro Branco, fama kiel loko por praktikado de akvaj sportoj.

Beach Park
Ekiro: ekde la sepa kaj duono Daŭro: unu tago Prezo: R$ 20,00

Ene de la metropola areo de Fortalezo, plaĝo Porto das Dunas situas nur 22 km for de la urbo, kie troviĝas la fantazia turisma komplekso Beach Park.

Alvenante al la Parko vi havos liberan tempon por ĝui la varman akvon de la maro kaj la blankan sablon borderitan per palmarboj, aŭ eĉ partopreni en libere elekteblaj aktivadoj, kiel buggy-veturo tra la marbordo, kvadricikla promeno aŭ amuziĝo en la komplekso Água Park, kie troviĝas diversaj altegaj akvoglitejoj. Ĝi estas la plej granda akva parko el Latina Ameriko, kun siaj akvaj toboganoj, fortaj akvofluoj, varmigaj naĝejoj kaj pli multe. Ĝi estas deviga halto kaj allogejo por ĉiuj aĝoj. (La prezo ne inkluzivas la enirbileton al la akva parko).

Mundaú
Ekiro: ekde la sepa kaj duono Daŭro: unu tago Prezo:R$ 35,00

Kruda kaj ekzotika plaĝo ĵuse enmetita en la cearaan vojaĝplanon. Tie eblos al vi ekkoni la marĉregionon, riĉa je faŭno kaj flaŭro, per promenado ĉe la enfluejo de la rivero Mundaú.

Caponga/Centro das Rendeiras
Ekiro: ekde la sepa kaj duono Daŭro: unu tago Prezo: R$25,00

Antikva fiŝista vilaĝo, ĉirkaŭita de deklivegaj sablodunoj, ĝi estas ankoraŭ unu el la plej gravaj cearaaj fiŝkaptaj centroj. En la Centro das Rendeiras vi povos ĝui la riĉan cearaan manfaritaĵon. Ĝi estas fama laŭ lerto kaj arto de siaj puntistinoj. Vi povos rekte observi kiel ili faras tiujn belegajn puntojn.

Cumbuco
Ekiro: ekde la sepa kaj duono Daŭro: unu tago Prezo: R$20,00

Cumbuco estas konata pro sia sabloduno-parko. Nur 23km for de Fortalezo troviĝas tiu paradiza plaĝo, kie la vento konstante remuldas la peizaĝon movante senĉese la dunojn. Antikva fiŝista vilaĝo kun multaj eblecoj je amuziĝo kiel ekzemple la lago Parnamirim, kie eblas skii kaj fari

neforgeseblan promenon en specialaj buggy-veturiloj (larĝ-radaj veturiloj speciale kreitaj por veturi sur sabla tereno), tra la dunoj (kostoj apartaj), kiun vi elektas la intensecon de la veturado: kun aŭ sen emocio, antaŭ ol viziti la Bananan lagon, unu el la plej belaj kaj plej ŝatataj ripozareoj de fortalezanoj.

Urba turismado – Konatiĝo kun Fortalezo
Ekiro: ekde la sepa kaj duono Daŭro: tri horoj Prezo: R$25,00

Tiu ĉi ekskurso, ĉirkaŭ trihora konatiĝo kun la urbo, estas plena je belaĵoj, plena je emocioj kaj plaĉaj surprizoj. Vi renkontiĝos kun
Ĉefurbo de la ŝtato Cearao, Fortalezo estas paca kaj ĝojiga urbo, kie estas vigla nokta vivo. Plaĝo de Iracema, de Futuro, Beira-mar kaj Kulturcentro Dragão do Mar estas kelkaj el la allogaĵoj. Kulturcentro Dragão do Mar estas unu el la plej grandaj en Brazilo. La centro havas 30 000 kvadratajn metrojn. Tie, interalie, troviĝas Muzeo de Moderna Arto, amfiteatro por koncertoj, planetario, tri kinejoj, teatro, librovendejoj kaj diversaj kafejoj kaj restoracioj.

5. Prelegoj kaj aktivaĵoj

Ĉiuj esperantistoj estas invititaj kunlabori por la sukceso de nia Kongreso. Vi, kiu havas ion por diri, instrui, pligrandigi la konon de kongresanoj, kiun ajn kampon, kandidatiĝu plenumante la slipon por preleg-propono kaj ĝin sendante al ni, kiel eble plej frue. La limdato por sendi la slipon estas la 31-a de Marto 2008. Bv. Sendu ĝin al retadreso de LKK 43bke2008@gmail.com
Se vi intencas okazigi alian aktivaĵon, ankaŭ vi estas bonvena. Informu nin uzante la slipon por preleg-propono. Gravas, ke vi memoru la temon de nia Kongreso – Infano: kia grundo! - kaj se eblos konsideru ĝin en viaj prelegoj kaj aktivaĵoj.
(Ligilo al slipo por preleg-propono)

6. Budoj

Ĉiuj asocioj aŭ unuopuloj rajtas lui budon. La luo kostas R$25,00. Mendu vian budon, skribante al retadreso de LKK kaj deponu la koncernan valoron en la konton de Cearaa Esperanto-Asocio ĉe Bradesco – Agentejo 0682, konto 1.001.253-8. Bv. sendu al LKK anekse al la retmesaĝo la deponateston aŭ simple informu al ni vian nomon kaj la depon-daton. Informu vian nomon al

Bradesco-kasisto. Ankaŭ eblas deponi la valoron en la privatan konton de la unua kasisto, ĉe Banco do Brasil, Agentejo 3140-2, konto 41.937-0.
LKK-retadreso: 43bke2008@gmail.com

7. Komuna Loĝejo

Pri komuna loĝejo, baldaŭ la koncernaj informoj estos disponeblaj